

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 323 (89) KVINA EPOKO

JULIO-SEPTEMBRO 2002

FEDERANTO

EL MOVIMENT ESPERANTISTA A MALLORCA

XAVIER MARGAIS

**XIIª KONGRESO
DE K.E.F.
PALMA DE MALLORCA
21-24 MAJG 1925**

**FLORAJ LUDOJ,
EKSKURSOJ, FESTENO, k.t.p.**

NUMER
Cardinals: un
var 3, kvin-5, se
aŭ-9, dek-10, cen
2-dek du, 20-dadel
ent tridek tri. O
rimier, dekdua-de
arisi duono-me
es. Multiplien
le; duoblo-el dobl
uope-de dos en d

PRON
Personalisi m
ds; li-elli; si-ella
re); ni-nosaltres;
ils o elles; si-si (reflexiu), oni
oia, (indefinit).

En esperanto s'evita el tutejar.

ndaderament internacional en llurs elements, l'idioma Esperanto
ent facilissim pels homes de mitjana cultura, l'Esperanto
el merit practic d'aquest idioma.

PREFIXOS

Bo-parentio per matrin

6

ASSOCIACIÓ
CATALANA
D'ESPERANTO



KATALUNA
ESPERANTO-
ASOCIO

Apartat, 290 - 08200 - SABADELL
CATALUNYA - KATALUNIO

Peranto de: UEA (revuoj *Esperanto*, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo *Monato* kaj libroj), IKEL, *Literatura Foiro*, *Heroldo*, *La Kancerkliniko*, *La Ordo de Esperanto*, *Litova Stelo*, *Scienca Revuo* (ni peras ankaŭ aliajn revuojn)

Apartat/Poŝtkesto 290-08200 SABADELL (Vallès Occidental)
Catalunya/Katalunio Tel.93-710 96 36 Fakso: 93-716 36 33

Ret - adreso: kea@esperanto-ct.org

Ret - paĝo: <http://www.esperanto-ct.org>

Kotizoj por la jaro 2002: Individua Abonanta Membro 25 eŭroj; Individua Subtenanta Membro 50 eŭroj; Individua Dumviva Membro 500 eŭroj; Kolektiva Membro 50 eŭroj; Juna Membro 16 eŭroj.

Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona - Agència 461 Sabadell, Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053.

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Josep Franquesa; vicprezidanto: Joan Inglada; kasisto kaj provizora sekretario: Llibert Puig; komitatanoj: Roger Prieto, Anna Casasús, Arnald Massanas

Kontrola Komisiono: Sebastià Ribes, Òscar Puig, Xavier Murcia.

Kataluna Esperantisto: Llibert Puig, Marina Ollé.
Revizianto: Hektor Alos i Font.

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo: Apartat 32.318 - 08080
Barcelona

Impres a/Presita ĉe: Prest Graf. Sabadell. Tel. 93 725 50 91
Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

31a KATALUNA KAJ 4a TRANSPIRENEA KONGRESO DE ESPERANTO

(Kongresejo: Kultura Centro "Can Dulce"
str. Gran Via)

Laŭ ricevita provizora programo, la kongresejo restos malfermita ekde la 18:30 h. de ĵaŭdo 31a de oktobro, kie la LKK plezure akceptos ĉiujn frue alvenintajn kongresanojn.

Elstaras la oficiala omaĝo ĉe la urbodomo de la lokaj jam forpasintaj pioniroj Miquel kaj Andreu Arbona; la debato pri malgrandaj revuoj kun reprezentantoj de du lokaj kaj de *Monato* (reprezentos ĝin Paul Gubbins); la artaj vesperoj kun la teatraĵo *La Balkanikoj*, la koncertoj de loka grupo Aires Sollerics, de Kaj Tiel Plu kaj de Gianfranco Molle; literatura prelego fare de Paul Gubbins kaj tiuj pri la kongrestemo de Viŝnja Branković kaj Josep Franquesa kaj debato pri la angla kaj esperanto gvidata de Hektor Alos.

Prezentado de la libro "El moviment esperantista a Mallorca (1898-1938)" de Xavier Margais, videofilmoj, verdikto de la Dua Premio Delfí Dalmau, ekspozicio de miniaturoj pri kamparaj kaj metiaj laboriloj el Majorko kaj matenaj promenadoj kun interesaj vizitoj kompletigos la programon. Nepre ĉeestu nian insulan kongreson kaj aliĝu tuj.

Eblas vojaĝi aviadile aŭ ŝipe. Petu kompletan informon ĉe kea-kasisto@esperanto-ct.org aŭ tel. 93 7109636.

BONVENON AL GOTENBURGO

Unua bulteno de la 88a Universala Kongreso de Esperanto. mendebla senpage ĉe nia asocio kiel UEA-peranto.

La Kongreso okazos de la 26a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 2003. Ni plu informos en venontaj revuoj.

Kunsendatan vi trovas la aliĝilon.

Unua perioda konkreskotizo ĝis 31.12.2002 kostas 150 eŭrojn por individua membro de UEA (ne inkluzivas MG) kaj 190 por ne individuaj membroj.

Ekspozicio de miniaturoj

Temas pri privata kolekto de s-ro Joan Riera Obrador; kiun afable disponigos por nia Kongreso la aŭtoro.

(vasta raporto pri la temo legu en la dimanĉa suplemento de ĵurnalo AVUI de la 15a de septembro 2002)

BARCELONO

Kun la kunlaboro de la Esperanto-Departemento de Unesko-Klubo, nia asocio prezentis la ĉinan ĵurnaliston Peng Zhengming, kiu prelegis en la tiea ĉefsalono, sabaton la 27an de julio kun prezento de videofilmo pri sia lando.

Nia barcelona aktivulo Karles Berga estis intervjuita fine de aŭgusto de ĵurnalistino Dolors Massot en la ĵurnalo ABC. Temas pri ampleksa intervjuo, kie nia membro verve informas pri la vasta panoramo de nia lingvo kaj pri la okazonta Kataluna Kongreso en Sóller (Majoroko).

Eble kiel konsekvenco de tiu intervjuo kaj la Barcelona Televido kaj la Blua Kanalo de Vilanova ankaŭ invitis lin informi pri Esperanto. Nia asocio kore dankas la laboron de nia membro.

En la aŭgusta bulteno n-ro 21 de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizoj Internacie (ne)Agnoskitaj) aperis du paĝoj pri Esperanto pro iniciato de nia aktiva paro Ramon Perera kaj Neus Moly – ĉi lasta, membro de ties estraro reprezentanta nian asocion. Dankinda iniciato!

Sur unu paĝo reproduktiĝas nia alvoko por la Dua Premio Delfí Dalmau kaj sur la alia tre interesa artikolo pri la temo "Com pot ajudar l'esperanto al reconeixement internacional de Catalunya?" (Kiel povas helpi Esperanto al la internacia agnosko de Katalunio?). Oni mencias ankaŭ la retpoŝtan kaj TTT-an adresojn kaj de nia asocio.

SABADELL

La 12an de julio okazis en la loka sidejo de CES kursfina vespermanĝo kun la ĉeesto de majoroka geedza paro Margais-Abeya, kiuj instigis ĉeesti la Katalunan Kongreson. (vidu foton)

Lundon la 29an de julio CES gastigis la ĉinan ĵurnaliston s-ro Peng, kiu informis pri sia lando kaj la renkontiĝo finiĝis ankaŭ per komuna vespermanĝo. La loka ĵurnalo *Diari Sabadell* aperigis intervjuon kun foto.

VILANOVA I LA GELTRÚ

Ni gratulas nian karan vicprezidanton Joan Inglada, kiu gajnis premion en la kampanjo "Sublupee la Katalogo", ĉar li esprimis sian opinion pri ses lernolibroj uzataj de li.

Katalin Kovats, kiu gvidis la kampanjon, jene raportas: "Ene de la kampanjo-periodo entute 35 novaj opinioj enskribiĝis en la Katalogon pri 20 diversaj lerniloj (www.edukado.net/katalogo.jsp?nomo=titolo&nomKomenco=*&serchu=jes). Ĝojige estis, ke ricevis legantan opinion naŭ novaj, ĝis nun ne prijuĝitaj libroj. Entute la pritraktitaj nun estas 32. Neniu opinio troviĝas ankoraŭ ĉe 46 lerniloj, kvankam inter ili estas kelkaj statistike multe venditaj kaj uzataj.... Daŭre la plej populara (kun naŭ opinioj) estas la libro pri la Zagreba metodo."



KUNLABORAĴOJ

12a Internacia Esperanto-Kongreso kaj 38aj Baltiaj Esperanto-Tagoj

Ni duope planis ĉi-jare ferii en Baltio, serĉe de frisko kaj elteneblaj prezoj. Lastmomente ni eksciis pri la okazigo de du esperanto-aranĝoj en Latvio ĝuste dum niaj celtagoj, tiel ke ni tuj aliĝis rete kaj ekvojaĝis. La trajna veturado havis iom ŝokan finon: de Litovio al Lâtvio estas nur po unu trajno ĉiun duan tagon – kaj, ĉar ni laŭ murfia leĝo maltrafis la tagon, necesis finvojaĝi buse (busoj, cetere, elstaras kiel tre taŭgaj turismiloj en tiu regiono).

La du aranĝoj havis sian bazon en Rigo: la 12a Internacia Esperanto-Kongreso montriĝis aranĝo de Monda Turismo, la pola turisma agentejo el Bydgoszcz, dum la 38aj Baltiaj Esperanto-Tagoj estas tradicia esperanto-kongreso ĉiujare okazanta laŭvice en unu el la tri baltaj landoj. Ambaŭ aranĝoj longis po unu semajno.

IEK logis du tute malsamajn grupojn de homoj: tri-kvar busoj da polaj turistoj kaj dudeko da esperantistoj; entute laŭdire ĉ. 200 personoj. La kongresa temo estis: "Ekologio kaj multnacia kulturo en Latvio". Ekologio fariĝis taŭga alibio por ĝui la latvan naturon, kiu ravegas al sudulaj okuloj: ni konatiĝis kun du parkoj de la verda Rigo kaj en tri tuttagaj ekskursoj kun diversaj naturaj vidindaĵoj de la lando. La duan kongresan temon ni apenaŭ rimarkis, se ne temas pri la ĉiutagaj koncertoj en diversaj lokoj de kvar kunveturantaj polaj ensembloj. Estis agrable ilin aŭdi kaj vidi, sed aŭskulti tri fojojn aŭ pli la saman repertuaron eltenas malmultaj grandanimuloj. En la koncertoj partoprenis ankaŭ latvaj grupoj (ĉiam malsamaj kaj tre plaĉaj), sed indiĝenajn spektantojn ni apenaŭ nenie rimarkis.

La organizado bedaŭrinde estis nekontentiga, jam de la akceptado. La unuan tagon de la aranĝo ni maltrafis i.a. pro organiza fuŝo. La du sekvajn tagojn ni du sentis nin ekzilitaj en tutpola aŭtobuso, kie oni apenaŭ informis nin pri la vidindaĵoj aŭ la celo de la diversaj survojaj haltoj – dum praktike ĉiuj esperantistoj kunvojaĝis en alia buso. Feliĉe la aferoj pliboniĝis en la lasta duono de la aranĝo. Laŭ nia kompreno plimulton de la problemoj naskis la troa supersutiteco de la ĉefa respondeculo kaj ne sufiĉa kunordigado inter latvaj kaj polaj gvidantoj. Kvankam ni finfine ĝojas, ke ni konatiĝis kun diversaj belaĵoj kaj interesaj

homoj, ni tre zorgeme konsilus iun ajn partopreni alian t.n. kongreson de Monda Turismo.

Senpere post tiu unua aranĝo venis esperanto-kongreso laŭ klasika formato: en kongresejo, kun prelegoj, kursoj, ekskursoj kaj distraĵoj. Ĝin partoprenis preskaŭ 180 homoj, ĉefe el Baltio, Skandinavio, Germanio kaj la nemalhavebla buso da polaj komencantoj. Ĉi-foje jes eblis babili kun latvoj kaj pli profunde konatiĝi kun ilia ŝanĝiganta lando. Ni tre ĝuis ankaŭ kurson pri la latva lingvo kaj kvarsesian prelegon pri la enlanda literaturo. Ni principe aparte interesiĝis pri la t.n. "somera universitato", sed ties nivelo ofte montriĝis katastrofe malalta: tri prelegoj estis ĉielklamaj sensencaĵoj. Estas konate, ke post diktatora reĝimo multaj iamaj malpermesitaĵoj ekŝajnas mirindaj, kaj tio vaste malfermas la pordon al la plej malverŝajnaj ezoteraĵoj, sed estas apenaŭ kredebla tia vico de plenaj stultaĵoj. Anstataŭ "universitato" oni ĝin prefere nomu "speaker's corner", laŭ la londona parkangulo, kie kiu ajn elkraĉas sian direndon.

Krom tio, kiel dirite la kongreso pruviĝis tute trafa por konatiĝi kun Latvio: ĝi tion sukcesis multe pli kontentige kaj profunde ol klasika turismado anglalingva, kiun ni dekomence antaŭvidis. Aldone, tio, ke la kongreso okazis meze de granda kaj alloga urbo, kiel kutime, faciligis la deturniĝon el la ne tiom ŝatataj programeroj por pli profunde ĝui la urbon, ties vidindaĵojn kaj muzeojn: bonege por la turistoj kiel ni, sed eble ne tiom por la homoj serĉantaj esperantan etoson. Cetere, vizito de la trafega aranĝita kaj lerte pedagogia muzeo pri okupacio estas nemalhavebla por eksterlandano; ni tre miras, ke ĝi ŝajne riskas malaperi.

Bedaŭrinde en tiu semajno la temperaturoj altiĝis super 30 gradojn, ĉesis la beninda regula pluveto kaj ni rostiĝis en nia saŭco laŭ la kutima somera kuirrecepto. Pluraj tre kompreneble forkuris al la tuj apuda maro.

Post du latvaj semajnoj ni vojis suden al la esperanto-domo en Kaŭno, la ĉefloko de la viglega esperanto-movado en Litovio: ni eksciis, ke nur tie en la unua semestro de la pasintjara kurso eklernis la lingvon 90 homoj, kaj en la dua iom malpli. Tio verŝajne de jardekoj ne okazas en okcidenta Eŭropo. Oni tre gastame nin akceptis kaj restis senpage dum tri tagoj. La domo estas tre historia: tie loĝis kelkajn jarojn la legenda esperanto-verkisto Trevor Steele (jes, ni kuŝis en

Lia lito). Krom tio la domon posedis la bopatro de Esperanto-pioniro, Ludoviko Zamenhof, kaj tie kreskis lia edzino, Klara Zilbernik. Tri tagoj evidentiĝis apenaŭ sufiĉaj por bone konatiĝi kun tiu bela kaj agrabla urbo (ni ne diru pri la ĉirkaŭaĵoj aŭ eĉ viziti la tre laŭdatan Vilnion), sed ni havis la okazon praktike uzi la ĵus eldonitan tre belan kaj kompletan buŝuron tutkoloran, grandformatan kaj 28-paĝan por supraĵe malkovri miriadon da oldaj domoj, plejadon da imponaj preĝejoj kaj svarmon da atentokaptaj muzeoj – el kiuj la art-galerio de Mykolas Žilinskas nin aparte surprizis kaj impresis.

Fine, substreke menciindas la libroservoj en Rigo kaj Kaŭno, de kiuj ni favorpreze akiris plurajn ekstreajn kilogramojn por nia revenvojaĝo. Necesis aĉeti novan sakon por ĉion kunporti.

Post ĉio, ni restas plene kontentaj pri nia vojaĝo kaj kun grandaj deziroj reviziti Baltion.

HEKTOR ALOS I FONT

La Baza Rento¹ : kio ĝi estas kaj kio ĝi ne estas

Nova propono starigis senprecedencan kaj publikan debaton rapide ekspansiantan en Eŭropa Unio. Kelkaj konsideras ĝin vera provoko, aliaj – sensencaĵo, dum pliiĝas tiuj ĝin konsiderantaj rimedo teknike kompetenta kaj norme sendifekta.

¹ Rento, laŭ PIV, estas 1) Perioda enspezo de proprietulo, kiun li ricevas de farmanto por la uzado de la grundo, domo kaj maŝinaro 2) Jara profito de investita kapitalo.

Laŭ la libertariano (ekstreme dekstra liberalulo) Hillel Steiner (1992), la naturaj rimedoj dekomence apartenas al neniuj; ĉar oni ne povas dispartigi inter ĉiuj la interezojn de la distribuo de la naturaj rimedoj, oni devas anstataŭigi ilin per la universala BR.

Laŭ Philip Pettit, verkisto pri respublika teorio: "Se respublika ŝtato sin devontigas al la progreso de la afero de la libereco kiel ne-superforto inter siaj civitanoj, ĝi ne povas elturniĝi sen adopti politikon antaŭenirigantan la sociekonomikan sendependecon". Libereco kiel ne-superforto estas la neebleco esti leĝatencata de aliuloj per arbitraj interferoj, malkiel ĉe la libertariana libereco, kiu malpermesas iun ajn interferon. La starigo de la BR supozus la sociekonomikan sendependecon.

Baza Rento (de nun BR) estas enspezo pagata de politika komunumo al ĉiuj ĝiaj membroj, sen ajna enketo pri la rimedoj aŭ laborpostulo.

Laŭ la ĵusa difino, oni ne konfuzu la BR kun io ajn simila al la jam konataj kondiĉaj monhelpoj de la socia ŝtato, kiujn oni foje malĝuste nomas baza rento. Oni ankaŭ ne konfuzu ĝin kun la negativa enspez-imposto, famigita de la konata liberala konservativulo Milton Friedman, Nobel-premiito pri ekonomiko – kvankam ili kunhavas ne nur grandajn, sed ankaŭ ne supraĵajn similecojn.

La termino BR ne estas unuanime uzata por ĉiuj, kiuj apogis, kritikis aŭ debatis tiun socialan proponon. Jen nur kvar aliaj nomoj: garantiita universala monhelpo, socia dividendo, civitana rento, garantiita enspezo. Angle, la plej disvastigita esprimo estas basic income, kaj france – revenu de citoyenneté.

Estas multaj socialaj alternativoj, konkretigitaj per modifproponoj por kontraŭstari nedezirindajn realaĵojn. Tamen ne ĉiuj proponoj estas dezirindaj, nek ĉiuj dezirindaj estas realigeblaj.

Por taksu iun ajn profundan socialan proponon (kaj tiu pri la BR sendube estas tia), estas rekomendinde postuli, ke ĝi trapasu du filtrilojn: tiun pri la etika dezirinda kaj tiun pri la teknika vivebleco. Krome, laŭ ĉi tiu ordo. Ekzistas plumeblaj socialaj proponoj ne eltenantaj la plej etan norman elprovon (kiel tiuj proponoj pri sociala justeco postulantaj la unu-rasan aŭ unu-seksan superregadon), dum same abundas la etike pli-malpli dezirindaj socialaj proponoj sed praktike tute nerealigeblaj, pro ekonomiaj, psikologiaj, biologiaj aŭ politikaj kialoj. Tio neniel rilatas al BR. Estas bonaj normaj kaj teknikaj kialoj ĝin favorantaj.

Ĉar ne eblas ĉi tie eĉ skize listigi tiujn kialojn, mi atentigos pri la plej gravaj diferencoj inter la BR kaj la kondiĉaj monhelpoj de la nuna socia ŝtato.

Por atingi monhelpojn, kiuj malkiel ĉe la BR estas kondiĉa, oni devas superi esploron pri rimedoj, kiu kelkfoje estas klare humiliga. Por bildigi la ĵusan aserton, indas citi kelkajn necesajn kondiĉojn por ricevi tian monhelpon, la Minimuman Renton de Insertado (de nun RMI), kiun diversaj autonomaj komunumoj de la Hispania Reĝlando starigis por kontraŭbatali malriĉecon. Tiuj kondiĉoj estas jenaj: havi loĝejon daŭran kaj efektivan; esti membro de

KUNLABORAĴOJ

memstara hejmo; malhavi ekonomiajn rimedojn por kovri la esencajn bezonojn; promeso partopreni en individua enlaboriga programo; havi neniun alian monhelpon superantan tiun de la RMI; esti neniam libervole rezigninta postenon; disponi nek pri moveblaj nek pri nmoveblaj posedaĵoj, kiuj pravigus ekonomian sufiĉecon; konsenti ne juĝe postuli alimentojn; kaj neekzisto de aliaj ricevantoj de la RMI en la familia unuo.

La kondiĉan monhelpon oni enspezas nepre ex post, t.e. post kiam oni pruvis, ke la rimedoj ne superas la fiksitajn sojlon, kiu rajtigas ĝin ricevi. Atinginte difinitan kvanton, la kondiĉaj enspezoj ne plu povas kreski; oni ne povas enspezi pli multe. Se oni ricevas aldonan renton, oni perdas la tuton aŭ parton de la monhelpo. Tamen la BR:

- 1) ne postulas esploron pri rimedoj ĉar, laŭ difino, ĝi estas universala;
- 2) oni ricevas ĝin ex ante; kaj
- 3) ĝi ne havas limon, ĉar oni povas ĝin aldoni al aliaj enspezoj.

La RB influas tre malsimile al la kondiĉaj monhelpoj rilate al konatajn problemojn: la trompo de la malriĉeco kaj la trompo de la senlaboreco. La unuan trompon (la dua estas fakte speciala kazo de la unua) oni difinas jene: la puno suferata de tiu, kiu akceptas pagitan laboron estante ricevanto de kondiĉa monhelpo. La puno senigas je la ricevo de la kondiĉa monhelpo. Tre konata rezulto de tiu trompo estas la fraŭdo.

Alia karakterizo de la kondiĉaj monhelpoj diferencigas ilin de la BR. La unuaj difinas siajn eblajn beneficojn, kaj igas ilin posedantoj de tiu ŝarĝo, kiun aŭtoro difinis kiel "la stigmaton de malriĉeco".

La administra simpliĝo, kiun produktas la anstataŭigo de multaj kondiĉaj monhelpoj per la BR, favoras ĉi lastan. Kondiĉa monhelpo bezonas ege pli multajn administrajn kontrolojn por eviti eblajn fraŭdojn de homoj senrajtaj ĝin ricevi aŭ por kontroli, ke la ricevantoj ne plenumas laboron malkongruan kun la monhelpo. Pro kontrolaj komitatoj, interdepartementaj komitatoj, administraj teknikaj oficejoj kaj teknikaj konsultaj teamoj, antaŭviditaj en la demarŝoj kaj administrado de la kondiĉaj helpoj kontraŭ la malriĉeco, plejparton de la rimedoj foruzas la burokrataj demarŝoj.

Ankaŭ la voĉdona rajto ne ĉiam estis universala. La ideo pri universala voĉdono, t.e. doni voĉon al ĉiuj, sendepende de ilia enspezado, de ilia klereco aŭ de ilia sekso, havis elstarajn kaj respektindajn dekstrulajn malamikojn (pro principaj kialoj) kaj maldekstrulajn (pro konsideroj pri politika konveneco). Tiun kontraŭstaron oni eliminis de la publika opinio per simpla ideo etike nerezistebla. Hodiaŭ neniun komprenas la demokration kaj la liberecon (malgraŭ la diversaj kaj kontraŭstarantaj opinioj pri libereco, ekzemple la liberala kaj la respublikana) sen la definitiva venko de la universala voĉdono. Mi taksas nekomprenbla ankaŭ la estontecon de la demokratio kaj de la libereco sen la civitana universala rento, t.e. sen la politika garantio pri la rajto je ekonomia kaj socia ekzisto de ĉiuj, nur pro la simpla fakto esti civitanoj aŭ, nuntempe kiam multaj homoj el malriĉaj landoj estas pelitaj al migrado, havi stabilan loĝejon.

DANIEL RAVENTÓS PAÑELLA
(Profesoro ĉe la Barcelona Universitato
kaj prezidanto de la asocio Xarxa Renda Bàsica -
Reto por la Baza Rentoj)
Esperantigis: LLIBERT PUIG kaj JOAN INGLADA

Niaj gastoj raportas

Dum unu semajno, en pasinta majo, ni vizitis Barcelonon kun nia eta filo. La urbo estis tute taŭga por familia turismo, kaj facile trapromenebla kun eta infano.

Ni havis la okazon renkonti niajn geamikojn Neus kaj Ramon, kaj ekkonis plurajn samideanojn, inter kiuj Pako kaj Karles kaj aliaj interesaj personoj. Estis interese viziti la sidejon de la Klubo de Amikoj de Unesko, kie okazas Esperanto-kursoj, kaj lerni pri la historio de tiu loko.

La vidindaĵoj de la urbo tute plenigis unusemajnan restadon. Okaze de la jaro de Gaudí vere indus viziti multajn belegajn konstruaĵojn: la domojn Milà kaj Batlló, la preĝejon de la Sankta Familio, la Malsanulejon de la Sankta Kruco, la Parkon Guell, la Palacon de la Kataluna Muziko. La preĝejo de Sankta Maria de la Maro, la Muzeo Picasso kaj la Fondaĵoj Miró kaj Tàpies elplenigis la kulturalan programon.

KUNLABORAĴOJ

Sed ni havis ankaŭ tempon por distriĝi promenante tra la malnova urbo kaj la Eixample, en la Ramblas, ĉe la haveno, en la merkato de la Boqueria kaj al la plaĝo. La urbanoj estas tre agrablaj kun eksterlandanoj, ĉefe se kun eta infano. Estante italoj, ni sentis nin kvazaŭ hejme.

Sume, ni vere rekomendas viziti Barcelonon sen hasto, ĝuante la etoson de tiu mediteranea metropolo. Ĝis revido!

GUIDO kaj SABINA RICCI (Italio)

Saluton! Mi nun estas en Sabadell, en Barcelono aŭ ĉe Mediteraneo. Hieraŭ pli ol 20 s-anoj renkontiĝis kun mi en la Unesko-Klubo en Barcelono, la fama kataluna ĉefurbo. Morgaŭ s-anoj el Sabadell renkontiĝos kun mi en la konata Centro de Esperanto Sabadell, kie hodiaŭ fakte mi promenadis, akompanita de lokaj s-anoj kaj unu kanada vizitanto, kiu preterpasis.

Ni kune promenadis sur la fama strato Ronda Zamenhof, fama ĉar ĝi estas la unua strato en la mondo laŭ la nomo de Zamenhof! Ĝi estas sufiĉe longa, kaj sur ĝi staras monumento kun verda stelo kaj busto de Zamenhof. La du lokaj akompanantoj, Karlo kaj Glòria, estas nove bakitaj lernantoj de la lingvo. Kvin el ok finlernis post dujara studo, po du horoj semajne. Hieraŭ kaj antaŭhieraŭ, respektive Kristofol kaj Hektor akompanis min viziti Barcelonon. Mia gastiganto ĉi tie 68-jara Llibert estas la ĉiama motoro de la loka movado, jam dum pli ol 50 jaroj kontribuas al nia lingvo kaj restas vigla kaj juneca. Fakte esperantistan familion li havas, lia edzino kaj gefiloj ĉiuj povas paroli Esperanton.

Ĉi tie kvankam ĉe Mediteraneo, vetero iom varma, tage 33-35 gradoj, fojfoje kiel Wuhan. Estas multaj

montoj, el ili vizitindas kelkaj. Ni vizitis Montjuïc kaj Montserrat.

Nu, mi nun iomete revene rakontos pri mia restado en Tuluzo, kie Rikardo, ankaŭ kun sia esperantista familio akceptis min. En la hejmo pli ol dek s-anoj kunĝuis la tempon. Ĉe li mi eĉ ĝuis la filmon pri vizito de Wang Xigeng kaj liaj kunvojaĝantoj, antaŭ dek jaroj.

Rikardo ĝis nun, kiel Llibert en Katalunio, bonege kunordigas lokajn esperantistojn. En Tuluzo mi vizitis, akompanita de esperantisto, la faman Spaco-Parkon, pri kosmoscienco, ĝi estas unika eĉ en Eŭropo.

Jen mi finas mian tajpon, preparas por veturi al Alakanto, la urbo de Hispana Esperanto-Kongreso, ŝajne antaŭ tio mi simple vizitos Madridon.

Via,
PENG (Ĉinio)

Preskaŭ du semajnoj pasis de kiam ni revenis hejmen, sed ni ankoraŭ estas plenaj da impresoj de belegaj urboj: Barcelono, Valencio, Alakanto kaj aliaj malgrandaj, kiujn ni vizitis.

La kongreso estis tre fruktodona kun multaj ekskursoj kaj prelegoj pri Hispanio kaj iliaj famaj homoj. Ni estas tre kontentaj, ke ni povis viziti vian landon. Post la kongreso ni du tagojn loĝis ĉe Andrés, kiu loĝas en Barberà del Vallès

Ni ankoraŭ foje dankegas vin pro via atento kaj helpo.

Amike salutas,

GRIGORIJ GEĤT kaj filino ILONA (Odeso, Ukrainio)

MONDVOJAĜO

La 12an de aŭgusto niaj vojaĝantoj komencis siajn preparlaborojn en Britio kaj la 19an de la sama monato komenciĝis la aventuro. Nekredeble, sed ĉiutage ili sendas raporton pri siaj travivaĵoj, kio fariĝos sendube la kerno de poste eldonota libro kaj katalune kaj esperantlingve.

Post vizito de la *Reform Club* en Londono kiel en la fama romano, ili veturas al Parizo, Munkeno, Vieno, Budapeŝto, Bukareŝto, Bulgario, Istanbul, Teherano kaj Mashad en Irano kaj sekvas Turkmenio, Uzbekio (Buĥara, Samarkando, kun vizito a la tiea muzeo pri la paco kaj solidareco, esperantista iniciato). Kaj la vojaĝo daŭrigas, espereble kun sukceso ĝis la fino. Venonte ni plu informos.

(Vi povas sekvi la travivaĵojn de niaj vojaĝantoj per tralegado de iliaj raportoj ĉe la TTT-paĝo de KEA en Esperanto aŭ ĉe www.vilaweb.com/especials/rodamon en la kataluna kaj Esperanto)

RECENZOJ

Leginda membiografieto

Estonio, Latvio kaj Litovio travivis ŝtorman 20an jarcenton: ili ŝanĝis suverenecon ne malpli ol sep fojojn. Tiom da iroj kaj revenoj tute ne estis sendamaĝaj: ĉiuj tri landoj perdis tre konsiderindan parton de siaj loĝantaroj dum ambau mond militoj. Krize-pinte, dum la lasta, la etnaj purigoj rusa kaj germana kaŭzis centojn da miloj da murditoj, forpelitoj (ĉefe Siberien) kaj rifuĝintoj eksterlanden.

Rakonto de kampara bubo tre plaĉe rakontas la vivon de juna latva kamparano antaŭ, dum kaj post la dua mondmilito. Ni konatiĝas kun la vilaĝa vivo de la 1930aj jaroj en bela kaj trafa skizo; ni ekscias, kiel iom post iom la politikaj okazaĵoj trenas la aŭtoron en la militan miasmon, kiel li fariĝas rifuĝinto en Germanio, kaj kiel fine li establiĝas en Anglio.

La verko, same kiel la lingvo, nur ŝajnas simpla, sed ĝi montriĝas lerte kaj agrable plektita. Ĝi ĉiam pelas al plulegado kaj la militaj teruraĵoj ofte ŝajnas preskaŭ fonaj dank'al la naiveco kaj la takto de la rakontanta *kampuleto*. Temas ja pri vivpriskribo de simpla homo kaj la dum militaj okazintaĵoj ne plenigas pli ol trionon de la tuta libro. Ĝisostaj esperantistoj, ekzemple, sendube tre aprezos la surprizan rolon, kiun ludis nia lingvo en la vivo de la aŭtoro. Mi mem aparte ĝuis la priskribon de la kampara vivo kaj absorbiĝis pri la militaj kaj rifuĝejaj travivaĵoj (bedaŭrinde tiaĵojn ofte la libroj pri historio preterpasas). La libro plenas je simpatiaj anekdotoj, kiel tiu de latva avino grimpinta "monton" por la unua fojo en sia vivo... en la angla Jorkŝiro.

Sola tubereto estas la malfortika glua bindado, sed mi zorgeme sukcesis tralegi la libron sen tio, ke ĝi disfalis.

Tre leginda libro sendube alportonta kelketajn horojn da plezuro al ĉiaj legantoj.

HEKTOR ALOS I FONT

Bruno Najbaro: *Rakonto de kampara bubo*, Latvia Esperanto-Asocio, 1994, 116 p. Prezo: ĉ. 6 €

Programa provisional del 31è Congrès Català d'Esperanto

Dijous 31 d'octubre

18:30 Trobada-assemblea de Majorka Esperantistaro. A partir d'aquest moment Can Dulce queda obert per a totes aquelles persones que ja siguin a Sóller per prendre part al Congrès, i la LKK queda a la seva disposició.

21:30 Sopar.

Divendres 1 de novembre

10:00 Arribada dels participants del viatge col lectiu des de Barcelona. Benvinguda i repartiment de documents.

10:.. / 12:00 Passejada per Binibassí, Fornalutx i tornada a Sóller

12:30 A Can Dulce, solemne inauguració del Congrès. Llengües catalana i esperanto.

14:30 Dinar.

16:00 Xerrades, taula rodona sobre la premsa local i internacional, amb assistència de la premsa sollerica, periòdics *Sóller*, *La Veu de Sóller* i *Monato*. En català i esperanto.

• Projectió del video sobre pobles petits de Mallorca. En esperanto

• Presentació del llibre *El moviment esperantista a Mallorca (1898-1938)*. Esperanto i català.

20:30 Recepció a l'Ajuntament, homenatge als pioners esperantistes sollerics Miquel i Andreu Arbona. Sopar fred.

21:30 A la plaça de Sóller. actuació de Kaj Tiel Plu i Aires Sollerics. En català, esperanto, sefardita, etc.

Dissabte 2 de novembre.

10:00 Passejada guiada per Sóller.

14:30 Dinar.

16:00 Xerrades i conclusions sobre el comerç local i universal. Participen: Comerç solidari, IKEF-UEA, (Josep Franquesa), en esperanto, i eventualment Fet a Sóller. En català i esperanto.

• Xerrada de Višnja Branković sobre El poble més petit del món. En esperanto.

• Projectió del video del dia anterior. En esperanto.

• Xerrada i debat gestionat per n'Hèctor Alòs sobre anglès/esperanto, relacions, coexistència etc. entre llengües gran i petita. En esperanto.

• Conclusions sobre els distints temes a debat. En esperanto.

21:00 Sopar.

22:00 Vespre d'art. Les Balcàniques. En esperanto.

• Guitarra: Gianfranco Molle. En esperanto.

Diumenge 3 de novembre.

• Literatura mateno/ prelego a càrrec de Paul Gubbins. En esperanto

• Veredictes del II premi Delfí Dalmau. En esperanto.

• Clourem tan assenyalades dates...

14:00 Dinar.